ZPRÁVY
KLUBU ESPERANTISTŮ
V PRAZE

ADRESA: PRAHA 1. HLAVNÍ POŠTA. SCHRÁNKA 1069

ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA
Řeznická 17, Praha 1
poŝtkesto 1069

1-a numero
januaro-februaro-marto 1970

## LA PAROLO DE LA PEEZIDANTO AL LA NOVA JARO 1970

Karaj geamikoj,

denove ni transiris la sojlon de nova jaro. La jaro 1969 forpasis kaj la nova jaro 1970 alvenis. Ĉu tiu ĉi nova jaro estos bona? Ĉu en la jaro 1970 vere mildigos la malamikaj sentoj en la mando? Ĉu en la jaro 1970 estos jaro de vera internacia kunlaboro sur la monda tereno? La respondo estas malfacila.

Certe la jaro 1970 alportos al ni – esperantistoj – mil eblecojn al laboro por harmonio kaj kompreno sur la tero. Nia tasko estas fariĝi ambasadoroj de la paco kaj amo. Esperanto estas la lingvo de paco, naskiĝinta el pura amo al la homaro.

Rerigardante la pasintan jaron ni povas esti kontentaj. Estis okazo por labori en nia Klubo kaj restis la ebleco de arniko kontakte kun ĉiuj niaj anoj pere de nia bulteno. Granda familio de nia Klubo vigle vivis kaj disvolviĝis. La programoj de niaj kunvenoj estis planataj kaj preskaŭ ĉiuj estis ankaŭ sukcese plenumitaj. La monsubteno de la membroj por nia Klubo prezentas bildon de sindonemo kaj oferemo. Dankon al ĉiuj!

Laŭ mia opinio ni povas kuraĝe kaj entuziasme eniri la novan jaron 1970. La seriozeco de nia laboro estas jam konata. La laboro por niaj idealoj riĉigis vivon de ĉiuj, kiuj sindone dediĉis sin al tiu laboro. Ni laboras por bona afero. Ni daŭrigu! Ni konservu kaj flegu nian amikan atmosferon kaj serĉu la vojon por plifortigi kaj plivastigi nian movadon! Mi eluzu ĉiun okazon por paroli nian karan lingvon! Ni altigu nian lingvan kontakton! Ni partoprenu ĉiujn niajn esperantistajn aranĝojn! Laŭre ni navu bonan kontakton kun nia Asocio kaj kun UEA.

Al ĉiuj membroj mi deziras FELIĈAN NOVJARON, SANON, ĜOJON kaj PROSPERU!!

Prof. D-ro Rudolf Horský

Program v prvním čtvrtletí 1970 – La Programo en la unua kvaronjaro 1970

LEDEN - JANUARO

| | | | |
|---|---|---|---|
| 5. | PHMr Plaňanská | – | Konstantinovy Lázně<br>Konstantinovy Lázně (banloko de Konstantin) |
| 12. | Ing. E. Felix | – | Diskuse o zkušenostech z vyučování esperantu<br>Diskuto pri la spertoj en instruado de Esperanto |
| 29. | Prof. D-ro R. Horský | – | Znáte svou vlast? Kviz s barevnými obrazy<br>Ĉu vi konas vian patrujon? Konkurso kun koloraj bildoj |
| 26. | Jaroslav Mařík | – | Zajímavě o patentech<br>Interese pri patentoj |

ÚNOR - FEBRUARO

| | | | |
|---|---|---|---|
| 2. | Josef Forman | – | Československý tisk o esperantu<br>Ĉeĥoslovaka gazetaro pri Esperanto |
| 9. | Eli Urbanová | – | Týden s Janem<br>Semajno kun Jan |
| 16. | Milada Josková | – | Mezinárodní lyžařský týden v Malé Fatře<br>Internacia Skisemajno en Malá Fatra |
| 23. | Arch. J. Drlík | – | Únorové události 1948<br>Februaraj okazaĵoj 1948 |

BŘEZEN - MARTO

| | | | |
|---|---|---|---|
| 2. | Olga Hankeová | – | Znáte Slovensko? (s barevnými diapozitivy)<br>Ĉu vi konas Slovakion? (kun koloraj diapozitivoj) |
| 9. | Jan Nevan<br>D. Zdvihalová | – | Mládežnický večer<br>Junulara vespero |
| 16. | Josef Vítek | – | Mělnický večer<br>Vespero kun esperantistoj el Mělník |
| 23. | | – | Výroční schůze<br>J a r k u n v e n o |
| | | – | Zpívá slečna Hana Řípová<br>Kantas f-ino Hana Řípová |
| 30. | Prof. D-ro R. Horský | – | Život a dílo učitele národů (s diapozitivy)<br>Vivo kaj verko de la instruisto de popoloj (kun diapozitivoj) |

**POKLADNÍ ZPRÁVA**

Spolu s minulým číslem našeho oběžníku jsme zaslali složenky všem členům, kteří ještě nezaplatili členský příspěvek. Mnozí z nich pochopili svou členskou povinnost a poslali dlužnou částku za rok 1969. K zbývajícím se znovu obracíme se zdvořilou žádostí, aby tak učinili nejpozději do konce ledna, nebo oznámili, že si nepřejí nadále zůstati našimi členy. Děkujeme všem, kdo svou členskou povinnost plní včas a bez upomínání. Legitimace jsme vydali všem, kdo zaplatili za rok 1968 a též nálepky k nim za rok 1969 doplnili. Komu by však chyběla, vystavíme novou legitimaci s příslušnými nálepkami.

Dnešní stav zaregistrovaných členů Klubu je kolem 350, z nichž se 180 členů doposud stalo též členem ČES, na jehož obnovení jsme tolik let čekali.

Jelikož se blíží počátek roku 1970, přikládáme k tomuto číslu složenku k uhrazení členského příspěvku, který činí ročně:

pro výdělečně činné 20,—
pro rodinného člena nebo studující Kčs 10,—.

Touto složenkou je možno zaplatit současně též členský příspěvek Svazu, pokud možno ještě za rok 1969. Každý dostane všechna 4 dosud vyšlá čísla svazového časopisu '"Starto". Členský příspěvek Svazu činí:

| | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| pro výdělečně činné | Kčs | 48,— | + | Kčs | 10,— | zápisného |
| pro důchodce, studující apod. | Kčs | 24,— | + | Kčs | 10,— | zápisného |
| rodinní příslušníci platí jen | Kčs | 10,— | + | Kčs | 10,— | zápisného. |

Zápisné se platí jednorázově při podání přihlášky za vystavení legitimace.

Všichni, kteří se již stali členy Svazu v roce 1969 a chtějí přiloženou složenkou uhradit svůj členský příspěvek za rok 1970 již zápisné znovu neplatí.

Legitimace Svazu byly již vydány. Pokud ji neobdržíte v našich klubovních schůzkách, budou vám zaslány poštou. Jak je vám známo, scházíme se každé pondělí od 19. hodin v Řeznické 17. Od 18. hodin je možno se zúčastnit konverzačního kursu, který vede Ing. E. Felix.

Rádi vás uvidíme v našich klubovních schůzích. Jestliže Vám vaše zaměstnání nebo jiné důvody nedovolují sejít se s námi často, přijdte alespoň někdy mezi nás.

Anna Barochová
pokladní Klubu

Estimata,

en la lasta kajero de "Zprávy" mi anoncis pri gazeto PACON EN VJETNAMIO (jarabono 7,—) kaj LA JUNA PENSO, por mi persone unu el la plej interesaj polemikaj esperantlingvaj gazetoj en la mondo (jarabono 16, —, dujara rabatita kotizo 27, —).

Ĉifoje mi proponas al vi pluajn avantaĝajn aboneblecojn de eksterlandaj E-gazetoj k. a., kiuj povas esti pagitaj per ĉeĥoslovakaj kronoj, kio kutime ne eblas.

KVINPINTO

estas organo de Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo. Dum la unua jardeko de sia aperado ĝi famiĝis per bunta kaj alloga enhavo inter esperantistoj en la okcidenta Eŭropo. En la jaro 1970 ankaŭ ĉeĥoslovakaj esperantistoj povas ĝin aboni. Kvar kajeroj jare kostas nur Kčs 12,— aŭ 6 internaciajn respondkuponojn. Fine mi ankoraŭ citu el la lasta numero 1969: "Kion fari el Kvinpinto en la nova jardeko? Nu, "komenco bona, venko duona", kiel diris sankta Ludoviko. Do ni komencu la 70ajn jarojn per – seksa numero. Jes, numero 1/71 de Kvinpinto temos pri amo, sekso ktp..."!

HEROLDO DE ESPERANTO
verŝajne estas pli konata al vi. Tiu ĉi duonmonata (!) internacia organo de la Esperanto-movado havas milojn da abonantoj en la tuta mondo. Nombro de abonantoj en Ĉeĥoslovakio estas limigita per kvoto, sed pro ĝia ioma altigo kaj ankaŭ pro tio, ke kelkaj abonintoj malfrue rekotizas, mi povas peri pluajn abonojn. Venantajn abonkotizojn mi akceptadas ĝis plenigo de la kvoto kaj la pli malfrue venantajn mi devos bedaŭrinde resendi. Heroldo estas ekde la jaro 1970 dissendata rekte el Belgio. La abonkotizo faras Kčs 55,— aŭ Kčs 110,— por tiu, kiu povas kaj volas esti subtenanto.

ANONCETOJ EN HEROLDO
povas ankaŭ esti pagitaj per kronoj. Anonceto ĝis 25-vorta kostas Kčs 25,-, ĝis 50-vorta Kčs 50,-. Se vi pagas samtekstan anonceton por dufoja aperigo, ĝi estos triafoje publikigita senpage. La tekston de anonceto bonvolu sendi kun indiko pri kia speco de anonceto temas al ĉisube menciita adreso. Vian anonceton legos miloj da esperantistoj en 56 landoj.

FABELOJ de H. CH. ANDERSEN
majstre tradukitaj de L. L. ZAMENHOF eldonitaj de Heroldo, volumoj I kaj IV estos en malgranda kvanto aĉeteblaj por kronoj. Ambaŭ volumoj havas kolorajn kovrilojn, po ĉ. 250 paĝoj kaj po 50 originalaj ilustrĵjoj, parte tutpaĝaj. La Fabeloj estos je dispono fine de januaro. Versajna vendprezo estas Kčs 45,— po volume. Mi ekspedos ilin ĝis elĉerpiĝo laŭ antaŭmendoj. Plezure mi informos vin persone en la Klubo, aŭ skribe (Vrchlického 41/493, Košíře, Praha 5).
Dezirante al vi ĉion bonan en la nova jaro sincere salutas vin

Ivo Železný

El la programo de Eli Urbanová...

**SEMAJNO KUN JAN**

Min ne riproĉu, aŭskultant',
ke pekis mi kontraŭ la moro;
mi nur malkaŝis en la kant'
kapricojn de l' Amoro.

Mi pekis, jes, en fantazi'
dum restis mi en viv' asketo.
Jen kiel stranga profesi'
donita estis al poeto!

MEMORINDA DATREVENO
Antaŭ cent dek jaroj, la 15-an de decembro 1859, en la malnova pola urbo Bialystok naskiĝis Ludoviko Lazaro Zamenhof. La naskiĝurbo kaj la loko de liaj infanaj jaroj donis la direkton al ĉiuj liaj idealoj kaj strebadoj. Sur ĉiu loko juna Ludoviko povis konvinkiĝi, kiel diverslingveco dividas kaj disigas popolojn.

La kreinto de Esperanto jam de la frua infaneco esperis, ke tiuj limoj malaperos, se ĉiuj homoj povos interkompreniĝi. Nun li dividas sian esperon kun ĉiuj homoj de bona volo, kiuj apud sia nacia lingvo sentas la bezonon de komuna lingvo. Al tiuj homoj li dediĉis la belan frukton de siaj laboradoj, la Lingvon Internacian.

Zamenhof substrekis, ke "la sorto de la vivanta lingvo ne povas dependi de sorto de tiu aŭ alia persono". La nova lingvo fariĝis vivanta kaj ĝia sorto jam ne dependis de la homo, kiu ĝin kreis, sed de ĉiam pligrandiganta anaro uzanta ĝin praktike.

Ing. Eduard Felix sepdekjara

La duan de decembro 1969 Ing. Eduard Felix, fidela kaj agema ano de nia Klubo, ĝisvivis sian sepdekjaran vivjubileon. Li ne apartenas al malnovaj esperantistoj; laŭ lia rakontado nur iam en liaj tridekaj jaroj venis en liajn manojn la libro "Mezinárodní jazyk" de D-ro St. Kamarýt. Li tralegis ĝin kun ega intereso kaj diris al si, kiel oni kutime diras: "tiun ĉi lingvon mi devas ellerni, kiam mi havos tempon".

Sed ĉi tiu promeso plenumiĝis nur tridek jarojn pli poste, kiam li emeritiĝinte forlasis sian profesion de konstru-inĝeniero. Tian, sesdekjaraĝa, li prunteprenis Esperantan poŝvortareton kaj eklernis. Post tri monatoj li aperis en nia Klubo kaj per balbuta Esperanto anoncis al mi, ke li volas fariĝi membro de nia Klubo.

Ekde tiu tago li apenaŭ mankis en iu kunveno, al ĉeĥa frazo ĉiam respondante esperantlingve kaj ĵaluze gardante la fonetikajn kaj ritmajn valorojn de nia lingvo. Laŭ li la etika genio de Zamenhof staras en unu vico kun Komenský, lia genio estetika viciĝas al tiu de Beethoven. Kontraŭ nia malnova devizo, paroli kun alilandanoj esperantlingve, kun samlandanoj ĉeĥe, li defendas alian principon: Kiu volas vere regi la lingvon, tiu devas eluzi ĉiun okazon por ĝin praktike apliki.

Ni ĉiuj deziras al li multan sanon kaj li ezoku ankoraŭ longe kaj gaje en nia fiŝlageto!

Bárochová

Kvindekkvina vivjubileo de nia prezidanto Prof. D-ro Rudolf Horský

Li naskiĝis la 4-an de decembro 1914 en Vamberk ĉe Rychnov nad Kněžnou. Abiturientan ekzamenon li faris en Česká Třebová, kie li finstudis la real-lernejon. Pli poste li dediĉis sin al studado de teologio en la Evangelia Fakultato de Hus en Praha, kie li, fininte siajn studojn en la jaro 1938 estis konsekrita pastro de ĉeĥoslovaka eklezio. Poste li aktivis kiel kateĥisto en diversaj prahaj lernejoj.

Ekde la jaro 1940 li estis dek jarojn paroĥestro en Žižkov. Fininte teologiajn studojn li dediĉis sin al studado de pedagogio en Filozofia Fakultato de la Universitato de Karel, kie li estis en la jaro 1949 promociita doktoro de teologio. En la jaro 1950 post fondo de Teologia Fakultato de Hus li fariĝis tie profesoro de religia pedagogio. En sia fako li aperigis vicon da publikaĵoj. En la nuna tempo Prof. P-ro Horský laboras kiel dekano de la Hus-Fakultato en Dejvice, kie oni edukas pastrojn de la eklezioj ĉeĥoslovaka kaj malnovkatolika.

Pri Esperanto li ekinteresis dum la teologia studado, sed pro la deviga lernado de klasikaj lingvoj (latina, greka, hebrea) kaj pro aliaj taskoj en la eklezia administrado, li ne havis tempon sin plene dediĉi al la E-movado. Tamen fervora aktiveco en paca laboro kristana lin kondukis al studo de Esperanto, ĉar li estis ofte komisiita serĉi kontaktojn kun pac-laborantoj en evolu-landoj. Li fariĝis meritplena laboranto por la Internacia Lingvo.

De la jaro 1962 li estas membro de nia Klubo kaj de la jaro 1967 ĝia prezidanto. Li vigle aktivas en Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI) kaj preskaŭ ĉiujare partoprenas ĝiajn internaciajn konferencojn. Li ankaŭ estas prezidanto de KELI-Sekcio de ĈEA. Li partoprenis kelkajn kongresojn de UEA (Vieno, Budapeŝto, Rotterdamo, Madrido) kaj en eksterlando li realigis vicon da priesperantaj prelegoj (Svedio, Danlando, Italio, Nederlando, Svislando, Aŭstrio). Gazetoj Dia Regno kaj Biblia Revuo publikigis vicon da liaj artikoloj.

Ni ĝojas, ke li malgraŭ sia troa okupiteco akceptis funkcion de prezidanto de EKP.
Ni kore gratulas nian ŝatatan jubileanton dezirante al li firman sanon, kontenton kaj multajn sukcesojn en lia fruktodona laboro!

Bárochová

Kun amikaj salutoj por
ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA

Prof. D-ro Rudolf Horský, p. m.
prezidanto

Miroslava Juřenová, p. m.
sekretariino

Anna Bárochová, p. m.
kasistino